

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



60a jaro n° 1
januaro - februaro 1968


Sonorilo

DUMONATA BULTENO DE B.E.F.

REDAKCIO : Jaumotte Maurice
Roose Fernand, Sint-Klaradreef 59, Brugge Tel. (050)319.81
Maertens Grégoire
Poupeye Charles

KUNLABORANTOJ AL REGULAJ RUBRIKOJ :
Dr. Pol Denoël Durwael Ivo Iserentant Roger

ADMINISTRADO : Terrynt Juliette, Raapstraat 72, Gent



ASOCIO SEN PROFITA CELO SIDEJO & PREZIDANTEJO
Debruyllaan 44, Wilrijk Tel. (03) 377758

HONORA PREZIDANTO HONORA VICPREZIDANTO
Kempeneers Paul Sielens Henri

GENERALA PREZIDANTO
Jaumotte Maurice

PREZIDANTOJ
Debrouwere Gerard, Magdalenastraat 29 Kortrijk
Dro Denoël Pol, 20 rue V. Raskin Liège

UNUA VICPREZIDANTO
Roose Fernand

VICPREZIDANTO FAKESTRO PRI TEKNIKAJ RIMEDOJ

GENERALA SEKRETARIO
Verstraeten Jules, Sint Bernardse Steenweg 1078 Hoboken

SEKRETARIO POR LA NEDERLANDLINGVA REGIONO
Maertens Grégoire, Prins Leopoldstr. 51, St.-Kruis
Tel. (050) 349 35

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO
Paulus Raymond, 73, rue de Montignies, Charleroi

KASISTINO Terrynt Juliette, Raapstraat 72 Gent - Tel. (09)255381

POSTKONTO DE B.E.F. : 1634 34 RAAPSTRAAT 72, GENT

ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Fr. Schellekens, Frans Hensstraat, 44, Antwerpen 2
P.K. 9051 25

Rotario

(la Frato de Esperanto)

NORMAN WILLIAMS

La unua Rotaria klubo fondiĝis en Chicago nur kelkajn monatojn antaŭ la unua Universala Kongreso de Esperanto, fakte en februaro 1905. La fondinto estis Paul Harris, usona advokato, nur ok jarojn malpli aĝa ol Zamenhof. Kiel Zamenhof li profunde amis la homaron kaj forte deziris plivastigi amikecon en la mondo. Li invitis kelkajn profesiajn konatulojn, tagmanĝi kun li unufoje ĉiusemajne, kaj poste ĉiu estis la gasto de la aliaj laŭvice, kio sugestis la titolon „Rotary“.

La movado iĝis internacia en 1910 kaj per zorge elpensita plano rapide kreskis, kaj nun en 1965 estas 12000 Rotariaj kluboj en 127 landoj kun 57000 membroj. Sed nuntempe ne estas Rotariaj kluboj en Hispanujo nek en landoj „malantaŭ la ferkurteno“.

„Rotary“ estas „Tutmonda amikaro de industriistoj kaj profesiuloj kunligataj per la idealo de servado al la homaro“. Ĝi estas tute neŭtrala organizo rilate al religio kaj politiko. Ĝia oficiala lingvo estas la angla, sed la oficiala organo, kun eldonnombro de pli ol 350000, estas ankaŭ eldonata en la hispana. Ju pli la movado kreskas, des pli serioza iĝas la lingva malfacilajo.

La reguloj de la Rotario Movado estas rigoraj. Ĉiu membro devas esti estro en sia fako, kaj ĉiu klubo rajtas havi kiel membron nur unu reprezentanton de iu fako. La membro devas labori en

la regiono de la klubo almenaŭ dum 60 % de sia laborhoraro. Rotariaj kluboj preskaŭ senescepte kunvenas je la sama horo en la sama konstruajo je la sama tago ĉiusemajne, kaj la detaloj estas presitaj en unu jarlibro por la tuta mondo. Dum la kunveno devas esti manĝo kaj parolado aŭ diskuto. Ĉiu membro rajtas viziti iujn ajn klubojn en la mondo sen invito. Membroj devas ĉeesti almenaŭ 60 % de la kunvenoj dum ĉiu duonjaro, sed anstataŭe li rajtas ĉeesti aliajn klubojn por duono de la 60 %, sed ne pli. Membro, kiu forestas kvar sinsekvajn kunvenojn sen permeso, perdas sian membrecon.

La Rotaria Movado havas unu celon, sed ĝi enhavas kvar sekciojn. Ĉiu klubo, ĉiu distrikto kaj ĉiu lando havas apartan komitaton por ĉiu sekcio de la celo. Do, estas en ĉiu klubo Komunuma Komitato, kiu prizorgas la servadon al la komunumo, kie troviĝas la klubo. Estas Okupada Komitato, Internacia Komitato kaj Kluba Komitato. Laŭ la Okupada Celo ĉiu membro devas esti bona estro en sia fako, honesta negocisto, simpatia dungisto ktp. Laŭ la Internacia Celo la klubo devas labori por internaciaj amikeco, paco kaj interkomprenado, kaj laŭ la Inter-membra Celo la Kluba Komitato devas labori por la spirito de frateco kaj amikeco inter la membroj mem kaj inter la membroj de aliaj kluboj.

La organizo estas tre forta kaj tre riĉa. La ĉefoficejo ankoraŭ estas en Chicago. Ĉiu regiono havas sian propran „Governiston”, kiu estas elektata por nur unu jaro. La „Governistoj” iras al Chicago el ĉiu parto de la mondo por ricevi siajn instrukciojn por la laboro de la jaro. Tiam ili reiras hejmen por transdoni la informon al la oficistoj de siaj regionoj, kiuj poste transdonas la informon al la oficistoj de la apartaj kluboj. Preskaŭ ĉiu regiono, ĉiu lando kaj eĉ ĉiu klubo havas siajn proprajn gazetojn. Okazas centoj da Rotariaj konferencoj ĉiujare.

La potenco de la Rotario Movado por la bono estas grandega. Amasiĝis granda aparta fonduso de ĉirkaŭ 5 milionoj da usonaj dolaroj por internaciaj agadoj. Ĉiujare proksimume 170 zorge elektitaj junaj universitatanoj estas subtenataj finance dum unu jaro de studado en alia lando, kaj en Eŭropo inter 60 kaj 70 internaciaj ferioj por gejunuloj estas aranĝataj ĉiujare.

La kredo de la Rotariano estas „Service above Self” (Servado super Si-mem), kaj ĉiu portas la universalan signon de membreco, kiu estas rado kun la vortoj „ROTARY INTERNATIONAL”. Treege malofte Rotariano ne portas la signon de membreco. Tra la tuta mondo Rotarianoj uzas siajn antaŭnomojn inter si, ĉar tio multe helpas la interfratecon.


La historio de Rotario kaj Esperanto ne estas feliĉa. De la komenco estis Rotarianoj, kiuj estis samtempe entuziasmaj Esperantistoj kaj antaŭvidis, ke finfine la Rotaria Movado bezonos internacian lingvon kaj ke Esperanto estas la plej taŭga. La Rotaria Esperanto-Amikaro fondiĝis en 1928

kaj daŭris ĝis la Dua Mondmilito. En 1931, en la Rotaria Internacia Kongreso okazinta en Vieno, Sir Charles Mander, eminenta angla Rotariano, proponis poresperantan rezolucion, kiu estis akceptita. Sekve de tiu rezolucio komisiono de Rotary Internaciuloj en Zŭrich esploris la demandon pri helplingvo kaj unuanime rekomendis Esperanton, sed bedaŭrinde en la konferenco de Rotario en Seattle, Usono, direktoro Sir Charlesles Mander, kiu tiel forte subtenis Esperanton en Vieno, subite ŝanĝis sian sintenon kaj komencis rekomendi alian — „Basic English”!

La verkisto de ĉi tiu artikolo provis restarigi la Rotarian Esperanto-Amerikaron en 1961 kaj jam kolektis pli ol 60 nomojn de Rotarianoj, kiuj estas Esperantistoj. Ili estas el Britujo, Usono, Brazilo, Japanujo, Nederlando, Francujo, Danlando, Norvegujo, Italujo, Finnlando, Maroko, Argentino kaj Kubo. La nomo de la nova organizo estas Rotaria Asocio De Esperantistoj (RADE).

La celoj de Esperanto kaj Rotario estas tre similaj, sed bedaŭrinde nek unu nek la alia sufiĉe bone komprenas la laboron de la alia. Estis ĉe Rotaria kunveno, ke mi mem unue aŭdis pri Esperanto, estis per Esperanto, ke mi amikiĝis kun multaj eksterlandaj Rotarianoj. La redaktoro de la revuo ESPERANTO malakceptis mian artikolon pri Rotario, kaj la redaktoro de THE ROTARIAN malakceptis artikolon pri Esperanto, do mi gratulas kaj dankas la redaktoron, kiu petas min verki ĉi tiun kontribuojon.

Kun permeso de la verkinto. Aperis jam en „Germana Esperanto-Revuo,,



50-A KONGRESO DE B.E.F.

BRUSELO

1, 2 & 3.6. 1968

pentekosto

ADRESO POR KORESPONDADO

F-ino M.F. Bauwens, 14 Av. Charles-Quint
Keizer Karellaan 14
Ganshoren

HONORA KOMITATO (Aldonigis)

Parlamentano

S-ro L. Major (Antverpeno)

Aliaj elstaraj eminentuloj

L.E. S-ro Harry R., Ambasadoro de Aŭstralio en Belgujo

S-ro Haulot A., Generala Komisararo por Turismo

S-ro De Deyne J., Prezidanto de la Komerca Cambio de Bruselo

S-ro Thomas C., Prezidanto de la kultura Fondajo "Charles Plisnier".

32 eminentaj reprezentantoj de la belga publika kaj kultura vivo, inter kiuj 18 deputitoj kaj 9 senatanoj, konsentis formi la Honoran Komitaton de la Kongreso. Ĉiuj ricevos inviton ĉeesti la Inaŭguron aŭ sendi mesaĝon al ĝi.

KONGRESEJO.

La Kongresa Komitato elektis kiel kongresejon la salonojn de Hotelo "des Colonies", 8 rue des Croisades/Kruisvaartstraat, Bruselo, situanta apud Placo Rogier, je kelkcentoj da metroj de la Norda Stacidomo. En la kongresejo funkcios akceptejo por disdono de la dokumentoj kaj por aliaj servoj al la kongresanoj.

ALVENO.

Ek de saboto matene, la 1-an de junio, en la oficiala informejo de la Norda Stacidomo deĵoros Esperanton-parolantaj fervojistoj. La kongresanoj estos atendataj de membroj de la kongresa komitato kaj de aliaj bruselaj esperantistoj ĉe la ĉefaj vagonaroj alvenantaj en la Norda Stacidomo. Akceptadi ne okazos en la aliaj stacidomoj.

Je alveno en Bruselo la kongresanoj aligintoj estas petataj unue iri al la respektiva hotelo, kiu -escepte de la junulgastejo- en ĉiu kazo situas apud la kongresejo. Post tio, oni vizitu la kongresejon por ricevi la dokumentojn kaj renkonti la aliajn esperantistojn.

FERVOJA RABATO.

Ĉiu aliginto ricevos ĝustatempe antaŭ la kongreso specialan rajtigilon, kiu ebligas al li ricevi 25 %-an rabaton por ir-revena veturo al la kongreso. (Valida nur sur la belgaj fervojoj)

FESTPAROLADO.

La Ambasadoro de Aŭstralio en Belgujo, L.E. S-ro Harry, akceptis festparoladi pri "Esperanto kiel lingvo por diplomatoj".

BANKEDO.

Partopreno en la jubilea bankedo, kiun sekvos la kongresa balo, kostas 260 fr. La efektiva prezo postulita de la restoracio estas pli alta, sed la Brusela Grupo, kiel kongres-gastiganto, alpagos la diferencon. Antaŭmendo kaj antaŭpago devos atingi la kongresan komitaton ĝis la 15-a de majo 1968.

ARTA VESPERO.

En la momento, kiam la nuna informilo estis verkanta, la programo de la Arta Vespero ankoraŭ ne estis finpreta. La kongresa komitato invitis elstarajn esperantistajn artistojn, kiel Flego kaj Rytikov, kaj celas altnivelan programon kun teatraj, kantaj kaj muzikaj partoj.

DIVERSOJ.

Katolika meso kun celebros kaj prediko en Esperanto okazos en indikota preĝejo apud la kongresejo. Se sufiĉa nombro da nekatolikaj kongresanoj esprimos la deziron, diservoj estos organizitaj ankaŭ por aliaj ritoj.

JUNULARO.

Kunveno de Belga Esperanto-Junularo okazos la 4-an de junio je 14 h. 30 en la kongresejo. Oni esperas povi organizi specialan feston gejunuloj lundon la 3-an de junio.

VIZITO TRA BRUSELO.

Se sufiĉe multaj nebruselaj esperantistoj esprimos la deziron, aŭtobusa ekskurso tra Bruselo kun klarigoj en Esperanto estos organizita.

LOĜADO.

Por mendi ĉambron por via kongresa restado, bonvulo utiligi la specialan mendilon eventuale mendota ĉe la LKK. BONVOLO NE SENDI MONON TIUCELE. En kazo de mendo kaj posta neebleco partopreni la kongreson, bonvulo informi la kongresan komitaton. En kazo de mendo kaj posta neutiligo de la ĉambro sen informo al la kongresa komitato, la koncerna kongresano estos respondeca pri la pago al la koncerna hotelo. LIMDATO POR MENDO DE LOĜADO: 15-an de majo 1968.

La kongreso rezervis jenajn kategoriojn de loĝado:

1) HOTELOJ (ĉiuj apud la Norda Stacidomo kaj apud la Kongresejo)

a) Hotelo Siru - unulita ĉambro: 300.- fr.

dulita ĉambro: 456.- fr.

(ĉiu ĉambro kun privata tualetejo kaj telefono)

b) Hoteloj Rembrandt kaj Touring - unulita ĉambro: de 150 ĝis 197.-

dulita ĉambro: de 285 ĝis 322.-

trilita ĉambro: 432.- fr.

La prezoj inkluzivas servon, impostojn kaj matenmanĝon.

2) JUNULARGASTEJO "Fraternité" (tre proksime al Suda Stacidomo): 50.- fr.

Rabato por membroj de la Junulargasteja movado: 10.- fr.

Tranoktado en komunaj ĉambroj kun po 6 - 8 litoj.

La tranoktantaĵo devos kunporti littukojn aŭ lui ilin ĉe la

Junulargastejo je prezo de ĉ. 20 fr.- Matenmanĝo, se dezirata, ĉ.

20.- fr. En "Fraternité" oni povos ricevi varman manĝon je kosto de 50.- fr., malvarma manĝo kostas 35.- fr.

EKSKURSOJ.

La kongresa lundo estos dediĉita al ekskurso al la Kastelo de Gaesbeek (ŝtatposedaĵo) kaj al la Nacia Botanika ĝardeno de Meise.

Prezo por la tuttaga ekskurso: 190.- fr. inkluzive de la transporto, enirbiletoj, trinkmono kaj tagmanĝo.

LA KASTELO DE GAASBEEK.

Ekstere, la Kastelo konstruita en 1240 de Godfredo de Loveno, provizita de multaj turoj kaj ĉirkaŭita de fosajoj kaj tri marĉoj similas al mezepoka fortikajo. Ĝin enloĝis, inter aliaj, la Grafo d'Egmont. Ĝiaj internaj honorkorto kaj konstruaĵoj memorigas, kontraŭe, francan kastelon.

Sennombraj trezoroj -tapetoj, valoregaj pentraĵoj (inter kiuj "La Babelturo" de M. van Valkenborch), lignaj skulptaĵoj, artaĵoj el marmoro, arĝento, albatro, porceleno, fajenco, ktp, kaj antikvaj mebloj - estas admireblaj dum la vizito.

La Kastelo troviĝas en la mezo de grandega parko kun nekalkuleblaj vicoj da kverkoj en vera Breughel-pejzaĝo. Kampara kafejo apud la Kastelo permesos al la ekskursantoj iom ripozi kaj refreŝigi.

LA NACIA BOTANIKA ĜARDENO - Meise.

La ĝardeno situas meze de 50 hektaroj da parko, en kiu agrable promeni aŭ sidi ĉe la moderna apudlaga kafejo.

La plantpalaco konsistas el serio da varmkulturejoj kun tropikaj kaj subtropikaj plantoj geografie ordigitaj.

PETO AL LA GRUPOJ.

Dum la Kongresa Malfermo okazos jubilea ceremonio omaĝe al la 60-jara datreveno de la Reĝa Brusela Esperanto-Grupo. Ĉiuj Esperanto-Societo de Belgujo estas jam nun afable petata delegi reprezentanton, kiu tiuokaze mallonge salutu la kongreson kaj bondeziru al la Jubileanta Grupo.

PROGRAMO

Sabato, 1/6/1968

12 H 00 - Malfermo de la ĝiĉetoj (kongresejo)

14 H 00 - Eventuala kunveno de instruistoj (kongresejo)

14 H 30 - Ĝenerala Kunveno de Belga Esperantista junulara Asocio
BEGA ESP. FEDERACIO

16 H 00 - Oficiala Malfermo de la Kongreso (kongresejo)

a) Malferma parolado de S-ro M. Jaumotte, prezidanto de BELGA ESP. ASOCIO

b) 60-jara Jubileo de la Brusela Grupo

- salutoj de la reprezentantoj de la grupoj

- honoriga parolado de S-ro R. Jacobs, prezidanto de la Reĝa Brusela Grupo

c) Festparolado de S-ro R. Harry, Ambasadoro de Aŭstralio en Belgujo, pri "Esperanto kiel lingvo por diplomatoj"

18 H 00 - Oficiala akcepto en la Urbodomo (Grando Placo) kun vizito (la transporto de la kongresejo okazos per kongresaj aŭtobusoj)

21 H 00 - Distra vespero (kongresejo)

Dimanĉo, 2/6/1968

9 H 00 - Katolika Diservo en Esperanto, fare de Pastro Saen, profesoro (preĝejo indikota)

10 H 00 - Laborkunsido de Belga Esperanto-Federacio (kongresejo)

12 H 00 - Libervola komuna tagmanĝo en la kongresejo (100 FB)

15 H 00 - Libervolaj vizitoj al:

a) Manneken-Pis Muzeo

b) Muzeo de Belaj Artoj

c) Muzeo de Naturaj Sciencoj

19 H 00 - Jubilea Bankedo (kongresejo)

20 H 30 - Kongresa Balo (kongresejo)

Lundo, 3/6/1968

10 H 00 - Libervola ekskurso al la Nacia Botanika Ĝardeno de Meise (foriro de la aŭtobusoj de Placo Rogier)

13 H 00 - Tagmanĝo en "Ancien Meli" en Meise

15 H 00 - Vizito al la Kastelo de Gaasbeek

17 H 00 - Reveno de la aŭtobusoj en Bruselo, Placo Rogier (apud Norda Stacidomo)

La Kongresa Komitato rezervas al si rajton modifi la supran programon.

La revbela vojaĝo de BEF al la kongreso de Madrid certe sukcesos: Ni interrilitas nun kun kvar anglaj samideanoj kiuj plej verŝajne kunvojaĝos kaj ni atendas la definitivan enskribon de grupeto el Loveno! Ĝis nun ni estas sen pliaj sciigoj el Antverpeno kaj Bruselo!

Tamen nun urĝas: ni sciigas al la hoteloj nun post la apero de tiuj linioj la definitivan ciferon por la loĝado kaj ni ne plu povas garantii bonan loĝlokon por la tro malfruaj enskribantoj! Povas okazi ke la lastaj kunvojaĝantoj devas loĝi en alia hotelo ol la granda grupo (rememoru la Usonanojn dum nia vojaĝo al Budapeŝto!)

Salamanca - Zaragoza - Granada - Sevilla - Madrid - Alta Mira: tiuj nomoj saltigis la koron ĉe ĉiuj kiuj ŝatas Hispanujon. Cetere ĉiu Esperantisto ŝatas kuniri kun la vere internacia karavano de BEF ĉar ni kunportas Esperantujon en la aŭtoĉaro dum la tuta vojo.

Nova iniciato (krom la kontakto kun lokaj grupoj, la programo en Esperanto kun multaj detaligoj, la interkona intervjuo niaj famaj amikaj rondoj vespere): kvizo pri Esperanto-historio kaj gramatiko surbaze de teksto de R. Iserentant.

Listo de partoprenantoj

S-ino Mention (Verviers) F-ino Chainneux Jeannine (Verviers) F-ino Lauwers Hilda (Assebroek) S-ro Lauwers Walter (Assebroek) S-ro Maertens Dirk (Sint-Kruis) S-ro Maertens Johan (Sint-Kruis) F-ino Verbeke (Lille) Ges. Middlemast (Bournemouth) S-ro Miskimnan (Skotlando) S-ro J. Rooke (Nederlando) S-ino van Walsem (Nederlando) Ges. Sprengers (Mechelen).

KOMUNIKOJ

- 1) La tria kongreso de STELO (= Studenta Tutmonda Esperantista Ligo) okazos en Aix-en-Provence de 13 ĝis 20 aŭg. 1968.
Informojn kaj programon ni presigos en venonta numero.
- 2) Dum la somero de 1968 okazos en diversaj urboj de Jugo-Slavujo internaciaj kulturaj ferioj.
Ankaŭ pri tio ni donos detalojn en la venonta numero.
- 3) Internacia Instruista Konferenco en Sonnenberg, la konata internacia Domo en la Harzmontaro, sude de Hannover okazos de 20 ĝis 29 sept.
Ankoraŭfoje detaloj kaj programo sekvos en venonta numero. Jam nun ni sciigas partoprenon de konataj personoj (i.a. Prof. Lapenna) Adreso: Helmut Sonnabend, 3161 Dollbergen, Im Eckerkampsfeld 11a Germanujo.
- 4) 1Va Internacia Esperanto-Seminario okazos en Torun Pollando kune kun Renkontiĝo de "Verdaj Familioj".
- 5) "Norda Prismo" komunikas.
Post la bedaŭrata morto de D-ro F. Szilagyi, la vidvino transprenis la redaktadon. (adreso: Döbbelskatan 66, BORAS, Svedujo).
Post la necesa reorganizo, aperos plej baldaŭ Memora Numero pri D-ro F. Szilagyi. La administrado estas ĉe E.J. Frost, Ved Fortunen 16, Lyngby, Danujo.



Marjorie Boulton: "Okuloj". Novelaro originale en Esperanto verkita. Eldonis "Stafeto" sur la Kanariaj Insuloj. 180 paĝoj, prezo: 1.80 Us. Dol.

Laŭ mi la subtitolo "novelaro" ne estas tute ĝusta. Kelkaj pecoj estas rakontoj.

Mi admiras M.B. kiel poeton kaj ankaŭ sian prozon mi tre ŝatas. Mi legis ŝiajn "Fajruoj de Esperanto" kiuj same meritas eldonon, kaj ŝiajn teatrajn skizojn. Kiam mi prenis en mano tiun ĉi rakontaron, mi tuj entuziasmiĝis ĉar mi rimarkis ke enestas "Ebrivigeo" kiun mi estis jam leginta en "La Nica Literature Revuo". Tiu rakonto estas efektive malgranda majstroverko. Post legado de la libro mi devas diri: ĝi restas nesuperita, kiom belaj la aliaj rakontoj ankaŭ estu.

La homo. Kaj do estas malĝuste ke oni povas plezurigi sekse, sen pli, sen kia ajn sekvo, tute aparte kaj tute sendepende de kio ajn alia. Nur bestiginta homo kapablas tion. Estas tial ke Paulino en tiu rakonto estas kondamninda. Kaj la rakonto mem estas neakceptebla el ĝeneralhoma vidpunkto, ĉar ĝi ŝajnas pravigi ion nepravigeblan, kaj ĝi ŝajnas meti la seksecon sur neĝusta loko en la hierarkio de la homaj valoroj. La sekseco, kiom ajn valora kaj bela ĝi estas en si mem, devas esti en la servo de io alia; devas esti ilo, ne celo.

Plie, oni ne konfuzu pasion kun amo. Cetere, ankaŭ en la unua rakonto "Okulo" la seksa pasio ŝajnas esti - laŭ M.B. - la supro de la amo. Vidu p. 11.

Karakteriza trajto de la libro estas la varieco. Tute diversspecaj ili estas. Ofte ili atestas pri granda fantazia talento de la aŭtorino kaj ankaŭ ofte la fino estas tre surpriza kaj neatendita.

Lingvaj rimarkoj: mi ne vidas neceson de la neologismo "ateliero" (jam la 6a vorto de la unua rakonto estas neologismo) sur p. 9; kaj de "demisio", sur p. 59. La vorto "krekapablo" sur p. 13 prefere havu disigan streketon (kre-kapablo) aŭ la literon o (kreokapablo). La sama rimarko validas ĝenerale por ne malmultaj kunmetitaj vortoj. Mi dubas ĉu sufikso "in" estis necesa en "viri-niĝintino" (p. 14).

La rakonto "Lernantino" devigas min fari seriozan rimarkon. Ne ke ĝi ŝokos multajn gelegantojn. Tio estas ne-esenca afero. Dum longa tempo en nia okcidenta civilizo la sekseco estis tabua afero. Al ĝi ligiĝis la nocio de peko, de io morale esence-malbona. Tio estis la ekstremo de la nenatura pseŭdomorala, aŭ pseŭdoreligia koncepto. Sed ne malmultaj "modernuloj" falas en la alian ekstremon. Ankaŭ M.B. ili prezentas seksan amuziĝon kiel esence saman aferon kiel foja, bona manĝado kaj trikado. Kaj tio estas eraro. Ĉu oni volas ĉu oni ne volas, do tute sendepende de nia volo, la sekseco estas nedisigebla de la psiko de

linio 26, 27 kaj p. 28 linioj 11, 12, 13. Ŝia rimarko pri kio ŝi nomas amo, sur p. 26-27, estas tute ĝusta kaj trafa, sed ŝi ne prezentas la amon.

Kaj nun alia stranga fenomeno. Tiu-ĉi libro entenas implicite psikologian kontraŭiron. La multrilate rimarkinda rakonto "La Venĝo-Komitato" kondamnas viron - tute prave, pro la teruraj sekvoj - kies agado, en la praktiko de la ĉiutaga vivo, estas identa al tiu de Leo en "Okuloj" kaj de Ralfo en "Lernantino". Kaj post legado de la libro mi havis jenan penson: Ĉu la tiel talenta verkistino M.B. neniam foje sentas internan psikan impulson por rakonti pri noblaj homtipoj; ĉu neniam ŝi estis inspirita de agoj de vera, pura, nobla amo? Kiom plena estas la nuna literaturo de pasio, de egocentrismo kaj de egoismo, kaj kiom malriĉa je amo. Tiel longtempe kiel mankos en nia esperanto-literaturo la priskribo de la noblaj facetoj de la homaro, mi devos diri: povra esperanto-literaturo.

Ekster tiu primorala rimarko, nur laŭdo. Bonega stilo. Riĉa vort esprimo.

Bela, literatura verko. Por tiuj kiuj opinias ke aperas tro multe da poemoj - kelkfoje estas nur sensencaj versoj - jen foje belega prozolibro.

Drs. F. Roose

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -	Vitro-cementoj por
„securit“ vitro	tutvitra-konstruaĵoj
kolorigitaj vitroj	mastiko
aluminiaj senmastikaj	
stangoj por kupoloj	

Telefono 37.88.20

Teo Jung: "Preĝo" Kompozicio en versoj. 16 paĝoj. Prezo: 1.50 Ned. Guld. + 0.20 por sendo. Eldonis aŭtoro mem en Scheveningen, Nederlando.

La poemo mem okupas 10 paĝojn; kaj ĝi estas vera kaj bela poemo. En ĝi la aŭtoro demandegas mil okulojn por vidi ĉion belan kion la mondo prezentas, mil orelojn por aŭdi ĉion belegan en la mondo, mil brakojn por alporti ĉie la bezonatan helpon, kaj mondampleksan koron. Lia bezono por havi amon kaj por doni amon, foje erarigas lin. Ekz. por montri la belegecon en la mondo li parolas pri la reton teksanta araneo. Sed tie ĝuste estas malharmonio. La poemo tre taŭgas por esti studobjekto en grupa kunveno, kaj por esti deklamata tie. Ni varme rekomendas.

Drs. F. Roose

Du poemaroj eldonitaj de "Stafeto" (direktoro: Dro J. Regulo-Perez) en La Laguna de Tenerife, sur la Kanariaj Insuloj.

Hendrik Adamson: "Vesperkanto" en la serio "Beletraj Kajeroj"; 132 paĝoj; prezo: l. 50 Us. Dol.

Edwin De Kock: "Fajro sur mia Lango" (brrrr...: Rim. de la Red.!) 120 paĝoj; sama serio; prezo: l. 50 Us. Dol.

La unue menciita poeto mortis jam en 1946, apenaŭ 56 jaraĝa. La dua estas nun ankoraŭ 37 jarojn juna. Sed kia diferenco en la poezio. Ne nur diferenco de personoj - ĉar ĉe ambaŭ la fundotono estas pesimismo - sed ĉefe de epokoj. Kiel radikale la konceptoj kaj la gustoj pri muziko ŝanĝiĝis, tiel radikale ankaŭ pri poezio. Adamson plaĉos al la ne plu junaj generacioj. Lia poezio estas ankoraŭ pli facile legebla, komprenebla kaj klarigebla (kondiĉe tamen ke oni bone regas esperanton.) Despli komprenebla ĝi estas post legado de la valora enkonduko fare de tiu alia talenta samlanda Estona poetino Hilda Dresen. Oni grupigis la poemojn laŭ kelkaj temoj. Tiel "Kamparo" listigas tiujn kiuj montras lian ĝojon pri la bela naturo, pro birdoj, ravaj pejzaĝoj ktp. Tie oni trovas ankaŭ bonajn poeziajn priskribojn de hejmaj scenoj. "Vagabonde" kontraŭe prezentas poemojn pri persona tragika sentado. Min plej impresis la kolekto "Tombrande". Kiel mi jam pli frue foje skribis, estas bedaŭrinde ke ni ne trovas la daton de la verkado de la poemoj. Tio kelkfoje ebligas sekvon de evoluo. Povas esti ke A. mem ne notis la daton. Ankaŭ bedaŭrinde ke kelkfoje la interpunkciado ne estas tute ĝusta. Tio ne gravas por kelkaj poemoj de la modernulo De Kock kiuj restus same nekompreneblaj kie ajn oni metus punktojn kaj komojn. Nur unu gramatika rimarko: "senti sin bone" devas esti "senti sin bona" (p. 9; linio 19). Ne ĉiuj poemoj estas egalvaloraj. Cetere, ĉe neniuj vekisto. Tamen, ĝenerale, Adamson ne atingis la altecon de ekz. Lajos Tarkony aŭ de Maŭra. Entute: bela poemaro kun kelkaj veraj juveloj.

La alian poemaron enkondukis la Islandano Baldur Ragnarsson per 8paĝa artikolo pri la verstekniko de Ed. De Kock... kiun la verkisto mem kompletigas per alia 8paĝa artikolo (en malgrandaj literoj) pri sama temo. Por la amatoroj. Cetere tiuj artikoloj estas sekvo de eseo kiu komenciĝis en la antaŭa poemaro de Ed. De Kock "Ombroj de la kvara dimensio". Por ilustri kiom malfacila estas la legado de ĉi-tiu poemaro, mi direktas vin al "Johaneto" (p.25) kaj al "Bedaŭro" (p.27). Mi eĉ riskas diri ke "Interne" (p. 53) estas tro komplika por esti ideala poezio. Kaj mi demandis al mi ĉu en tiu momento la aŭtoro kapablis adekvate esprimi? Sama rimarko por "Alten" (p.54). Por ilustri, aliflanke, kiel nunaj generacioj sentas, mi montras al la bela "Kristo" poemo sur p. 60. Tre originala kaj sencoriĉa estas "Gelernejanoj" (p.51). Ankaŭ tre originala la kvinmallonglinia "Enterigo" (p. 93). Tre sugesta estas "Memorante mian mortintan patron" (p. 37). Multaj liaj poemoj estas kvazaŭ surrealistaj pentraĵoj en vortoj; kiel "Sugestio" (p. 62); kaj postlasas senton de premiteco. Kiam mi legis "Respondeco" (p. 71-72) leviĝis antaŭ miaj okuloj la pentraĵo "Minaco de civilmilito" de Dali; mi ne scias kiel. La konata diraĵo "libro legita je malsama aĝo, estas malsama libro" aplikigas al tiu-ĉi poemaro. Kiam post nur kelkaj tagoj oni relegas ĝin - iom al kutimiĝinta al la tekniko kaj al la surprizaj bildoj kaj komparoj - ĝi estas jam tute alia libro: pli alirebla kaj (multe) pli bela. Fine mi volas atentigi pri la malalta prezo de la du volumetoj, se oni komparos kun similaj eldonoj en niaj Nederlanda kaj Franca lingvoj.

Drs F. Roose

Eija Salovaara: "Kie Boacoj Vagadas". Eldonis Dansk Esperanto-Forlag en Aabyh, Ingemannsvej nr. 9 en Danlando. Formato 15 x 21. Paĝoj: 71. Prezo: 7,50 danaj kronoj.

La unan vereman recenzon pri tiu-ĉi libro ni legis en "Esperanta Finnlando" nr. 2 de 1967: "Salovaara uzas ripete similajn, tre ĝeneralajn atributojn... Oni facile enuiĝas pro la ĉiama "vasta sovaĝa Laplando, la lando de la... vintraj fulmantaj Nordlumo...". La aŭtoro ofte ripetas saman aferon dufoje, ŝi tre multe uzas kelkajn vortojn... la sufikson -eg kaj ankaŭ ekkriajn signojn...".(p.10)

Tiu-ĉi libro efektive ne havas artiliteraturan valoron. Estas ekstreme simplaj rakontoj. Ekzemplo: filino de tre malsana patrino penege remboatas en malhelo por serĉi kuracistan helpon en fora vilaĝo. Ŝi sukcesas. Jen ĉio. Neniama neatenditaĵo - ja kaprico de la vivo; - kiu renversas situacion, kaj kiu faras la vivon tiel komplika kaj tiel varia. La sovaĝa ĉarmo de la lando de la boacoj tre impresis la aŭtorinon kaj ŝi volis skribi tion. Sed tio ne sufiĉas por ke la verko estu literatura. Aliflanke mi ne dubas ke multaj naturamantoj ŝatos la legadon de la libro. Ne ĉiu postulas ĉiufoje verkon kiu estu nepre arta.

D-ro F. Szilagyi: "Konversacia Esperanto-Kurso". 68 paĝoj. Re-eldonis la Dansk Esperanto Forlag; Ingemannsvej 9, Abyoj Danlando.

Prezo: 8 Danaj Kr.


S-ano L. Friis reeldonis tiun faman kurson de la jus mortinta D-ro F. Szilagyi kaj kiu, jam antaŭ tridek jaroj, atingis tiel grandan sukceson. Ĝi kompreneble ne estas kompleta, gramatika; sed ĝi lernigas kun plezuro, i.a. pro la komikaj desegnaĵoj de Adamson, kaj tio estas ankaŭ granda merito. Oni allogos pli da lernamaj personoj per tiu-ĉi ol per seka, gramatika, iom lingvosciencia lerno-libro.

"Uilenspiegel, tio estas Strigspegulo" tradukita de P. Wolrug kaj eldonita de Vulpo de Amsterdam, Verneerstraat 7, Zaandam. 16 paĝoj malgranda formato. Prezo: 2 Nederl. Guld.; kun mezepoke kolorigitaj ilustraĵoj: 3 NG. Tiu P. Wolrug estas neniu alia ol la juna sed jam konata talento Wouter F. Pilger. Li nun tradukis ses skizojn el tiu mondfama literaturajo de la malfrua mezepoko. Litertipo kaj ilustraĵoj estas el la epoko. Verkinto kaj eldonanto intencas eldoni pliajn tiajn libretojn pri elstaraj literaturajoj. Bona intenco. Ni esperu ke ĝi instigos iujn por traduki komplete tiajn verkojn. La entrepreno meritas apogon.

"Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj" Eldono de UEA. Prezo 2 intern. respondk. 12 paĝoj.

Ĝi estas kontribuo de UEA al la memorigo de la Homaj Rajtoj laŭ deziro de UNO. UEA havas ankoraŭ aliajn planojn kiujn ni entempe konatigos. Esperantistoj havas moralan devon divastigi tiun-ĉi broŝuron.

La libroj estas haveblaj ĉe la librejo „Sonorilo” (Sro Iscrentant R.) Kerklaan 61 BRUĜO, Poŝtĉekkonto 152140



Bela sukceso por Esperanto en Verviers

Nia junula sekcio multe aktivas. Aĝa nur 18 monata, ĝia tria manifestacio estis dokumenta ekspozicio kiu okazis en la 4a etaĝo de "Grand Bazar", dum 12 tagoj. La inaŭguro okazis la 12an-1-1968 sub la prezido de L.E. la ambasadoro de Aŭstralio, Sro Ralf Harry. Inter la multaj aŭtoritatuloj, ni citu: Sron Paris, deputito, la Reĝan Prokuroron, la urbestron, la skabenon pri instruado, la urban sekretarion, la Prefekton de la Ateneo, la Honoran Prefekton, la ĉefdirektoron kaj la ĝeneralan sekretarion de la belgaj "Grand-Bazars" kaj la direktoron de la magezenoj en Verviers. Ĉi-lasto bonvenigis la ĉeestantojn. Poste Georges Ledoux, prezidanto de la junula sekcio, klarigis la celojn de la internacia lingvon, kaj rakontis kelkajn spertitajn okazintaĵojn pri la lingvaj malfacilaĵoj dum sia 30 jara diplomata vivo. Dum tre komforta koktelo oferita de "Grand-Bazar", la ĉeestantoj laŭiris la ekspozicion kiu konsistis el pli ol 150 libroj pruntedonitaj de "Sonorilo", "Heroldo", la urba, grupa kaj individuaj bibliotekoj; el multaj komercaj, turismaj, politikaj kaj kongresaj dokumentoj, kaj ĉefe, el grandaj paneloj surpentritaj de la dekoracia ekipa de "Grand Bazar" pri la strukturo de U.E.A., pri statistiko de urboj havantaj straton kun esperanto aŭ Zamenhofa nomo, pri la lernejoj kie esp. estas instruata, pri la nomo kaj titolo de la eminentuloj kiuj subskribis la Peticion, ĉiuj apogataj sur la apudaj oficialaj dokumentoj de C.E.D.

Post tiu ceremonio, 12 fidelaj membroj akompanis la Ambasadoron al komuna vespermanĝo, kaj je la 20a venis al la festsalono de Ateneo kie prelegis la ambasadoro en esperanto kun traduko alterne de 2 junaj membroj, pri Antartiko, projektante 2 filmojn pri tieaj ekspedicioj. La salono estis plenplena kaj la entuziasmo tia ke, en la telero ĉe la elirpordo por bonvola financa kontribuo, akumuligis pli ol 800 frankoj.

La ekspozicio estis bone vizitata; lernolibroj bone vendiĝis, kaj ni kolektas la enskribojn por novaj kursoj, precipe por junulinoj el la liceo kaj la teknika lernejo.

La Grupo kunvenos mardon 30an-1-68; ĉe la tagordo: programo por la proksimaj monatoj, kaj por la 60a jubileo, festota la 20an kaj 21an de aprilo proksima, kune kun la Trilanda Renkontiĝo kaj Kongreso de la belga sekcio de T.E.J.O.

Jos Hérlion

HET WELGEKENDE
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING



in't duifken

GROTE KEUS
IN GEREDE KLEDING

KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN
UNIFORMEN - GABARDINEN - LODENS
STIJLVOL MAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

FONDAĴO M. Jaumotte-Loquet

FONDAĴO por la Disvastigo de la Informado pri ESPERANTO

Transpreno	121.941 F
Anonime (Verda Stelo)	500 F
Ges. J. Cassiman-Dine	100 F
	<hr/>
	122.541 F

(Pagoj akceptataj pere de la pĉk 291429 de Maertens Gr. Sint-Kruis)

ADMINISTRANTARA KUNSIDO DE B.E.F., la 30an de marto '68 je la 14,30a h.
Hotelo "Excelsior", Vooruitgangstraat - rue du Progrès, 10 Bruselo
(vid' al vide de la Rogiera Centro)

Tagordo :

1. Aprobo de la protokolo pri la antaŭa kunsido
2. Financa raporto de F-ino J. Terrijn
3. Renovigo de la Komitato :
 - a) Prezento de la grupaj administrantoj
 - b) Elekto aŭ reelekto de la estraranoj
 - c) Eksiĝo de F-ino J. Terrijn, kasistino
 - d) Eksiĝo de S-ro H. de Roover, ĝen. sekretario
4. Jubileaj festoj en Verviers
5. Unuformaj membrolistoj por la kasistoj
6. Interhelpo al programoj de la diversaj grupoj
7. Koresponda kurso
8. Diversaĵoj
9. Fiksado de sekvonta kunsido

GENERALA JARKUNSIDO je la 16a horo (en la sama salono)

Tagordo :

1. Financa raporto
2. Akcepto de proponita komitato
3. Diversaĵoj

Mi petas al la geadministrantoj konigi al mi la eventualajn punktojn kiujn ili volas aldoni al tiu ĉi tagordo.

J. Verstraeten
anstataŭanta ĝen. sekretario

AMIKAJ SALUTOJ EL ĈINIO

El la fora Ĉinio mi sendas al vi plej amikajn salutojn.

1962 estis proklamita "Maeterlinck Jaro". Vin certe ĝojigas la fakto, ke la verkoj de Maeterlinck estas tre ŝatataj en Ĉinio. Lia mondfama dramo "Blua Birdo" premiita per Nobel Premio, aperis en ĉina traduko jam antaŭ 30 jaroj. Lia belega poemo "Et s' il revenait un jour", kiu aperis en esperantaj tradukoj de prof. Waringhien. ("La Nica Literatura Revuo", n-ro 37, 1961) kaj de s-ano H. Castel ("Heroldo de Esperanto", n-ro 9, 1962), estis tradukita en ĉinan lingvon jam en 1935, kaj, kune kun aliaj liriko de anglaj, francaj kaj belgaj poetoj, estis kolektita kaj eldonita en libroformo en 1936 en Shanghai.

Kiel artamanton, min tre interesas vialandaj poezio kaj arto. Mi bone scias la francan kaj la flandran lingvojn. Mi fieras pri la posedo de flandraj lingvaj libroj: "Koninklijke Musea van België", "Het Onderwijs in België" k.a. Kiel juna esperantisto, mi tre ŝatas la poeziajn verkojn de belgaj esperantaj poetoj Claude Piron kaj Albert Samyn. Mi tre ĝojas, ke E-movado estas tre vigla en via lando.

Antaŭ jaroj, mi vidis rusan kolorfilmon pri la Monda Ekspozicio en Bruselo en 1958. La filmo montris la belegajn belgajn urbojn Bruselo, Antwerpen ktp. kaj la ĉarmajn belgajn pejzaĝojn, kiuj min ege allogis, kaj lasis al mi neforgeseblajn impresojn.

Finante tiun ĉi leteron, mi sendas al la belgaj gesamideanoj miajn plej sincerajn bondezirojn por 1968.

Armand Su (Ĉinio)

DU POEMOJ

de Armand Su

LA VERA AMO

La vera amo daŭras post la morto,
kaj la forpaso ne estas ĉion-forporto.
Al la plej fora stel' ĝi similas,
kiu en la obskura nokt' ĉiam brilas.
Kun l'tempo forsonos la kor-ploro,
sed neniam mortos la eterna memoro
pri la ĉiam vivanta am-imago,
kiu igas la vivon la plenhela tago.

SOPIRO

Al Tania

En sonĝo surirls mi legere
la konatan ŝtuparon al via dom'.
Vian nomon vokis mi tenere,
kiel la nokte vaganta fantom'.
Mia kor' tiel peze saltas,
kiam vian domon mi preteriras.
Senkonscie miaj kruroj haltas.
Kiel vin revidi mi deziras!
Nun jam estingiĝis la lumo.
Kaj via hejm' malplena restis.
Regas interne la frida mallumo.
Ĉar vi, kara Tania, jam forestis.

ANTVERPENO

Esperanto-grupo "La Verda Stelo"
Kunsidoj : Ĉiuvendrede en Brasserie
"Capitole", Gemeentestraat 15
Antwerpen je la 20,15a horo.
Poŝtĉeknumero : 726.54.

La 24an de novembro S-ro R. Van Eynde paroladis pri la SAT-kongreso en Malmö. Li rakontis, krom la ĉefajn oficialajn okazintaĵojn, ankaŭ multajn amuzajn travivaĵojn kiuj ege interesis la aŭskultantaron.

La 1an de decembro S-ino C. Thornburn paroladis pri "Skotlando" kaj montris kolorbildojn kaj diapozitivojn. La paroladistino, kiu lernis Esperanton en 1910, ĉeestis la 7an Universalan Esperanto-kongreson en 1911 en Antverpeno. Je tiu okazo ŝi persone vidis D-ron Zamenhof kiu honorigis la kongreson per sia ĉeesto. Krom la bela parolado S-ino Thornburn aŭdigis ankoraŭ skotan muzikon kaj organizis malgrandan ekspozicion pri diversaj tipe skotaj objektoj.

La 8an S-ro De Krom el Bruselo paroladis pri la Kanariaj Insuloj prezentante aron da bildoj kaj plenkoloraj diapozitivoj. La lerta kaj agrabla parolmaniero kune kun la granda ŝercemeco kaj facileco de la lingvo tiom enprofundigis la aŭdantaron ke oni preskaŭ forgesis la tempon.

La 15an, en la kadro de E.K.I. (Esperanto-Komitato Intergrupa) de Antverpeno oni organizis la Zamenhof-vesperon en la festa salono de la junulargastejo "Op Sinjoorke". Ĉe la enirejo Ges-roj Balleux kaj S-ro J. Bonte aranĝis belan kaj grandan libro-standon kiu tuj altiris la publikan intereson.

S-ro H. de Roover, en brila festparolado, pritraktis la pacoideon en la Esperanto-movado kaj precipe la pacemon de D-ro Zamenhof. F-ino A. Geelen, S-roj I. Durwael kaj C. Borremans prizorgis diversajn programerojn spritajn aŭ ŝercemajn. La popoldancgrupo "Rondinella" prezentis diversajn aplauditajn numerojn. Oni ankaŭ aŭdigis poemojn de J. Baghy kaj modernajn kantojn de la famiĝinta disko "Duo Espera".

Dimanĉon, la 17an la Infana Kristnaskfestoj kunigis 34 "verdstelanojn... La salono estis bele ornamita de F-inoj I. Wuyts, A. Geelen kaj S-ro Jo Haazen. S-ro M. Jaumotte

GRUPA VIVADO

denove estis la "animo" de tiu ĉi vespero kiun la infanoj plenkore ĝuis. Ili mem kantis, deklamis, prelegis, k.t.p. kaj abunde kaj plene gustumis la kukojn kaj ĉokoladon. S-ro J. Montmirail prezentis amuzan filmeton kaj S-ro R. Balleux ludis kun vera teatra talento la rolon de la "Kerstmantjetje" kiu, malavare, disdonis la frandaĵojn kaj donacetojn. Tamen necesas substreki tutspeciala la grandajn laboron kaj meriton de S-inoj Marg. Jaumotte kaj Nath. Balleux kiuj jam monatojn antaŭe antaŭ-preparis la bonan evoluon de la tuto.

La 22a disvolviĝis en "Kristnaska atmosfero". F-inoj A. Geelen, G. Hauteceur, I. Wuyts kaj S-roj Jo Haazen kaj R. Van Humbeek ornamis la salonon per kandeloj, verdajoj, kristnaskmotivoj, duonlumo, k.t.p. aŭ flegis diversajn programerojn. F-ino A. Geelen emociplene laŭtlegis el libro de Felix Timmermans "Kristnaska Triptiko" (tradukita de S-ro E. Paesmans jam antaŭ la 2a mondmilito!). S-ro Jo Haazen aŭdigis fragmenton el la fama "Historio de Kristo" de Giovanni Papini kaj prizorgis la muzikan sferon. Tombolo kun multaj premioj - kunportitaj de la ĉeestantoj - metis firman punkton je la fino de la programo.

La 29an dum la jarfina atmosfero S-roj M. Du Bois kaj J. Verstraeten rakontis travivaĵojn el sia vivo dum S-ro R. Balleux alportis distraneron por organizo de iu kvizo.

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO 3

Tel. : 16.89.92

Entrepreno de
KONSTRUAĴOJ

La 5an de januaro post tradicia novjara paroladeto de Prez. Jaumotte S-ro R. Balleux enkondukis la novan jaron per trafa programo : Rerigardo alla jaro 1967. Per lumbildoj, diapozitivoj kaj gazetaj eltondaĵoj li sukcesis refreŝigi la memoron de la publiko pri multaj gravaj okazintaĵoj kiuj staris en la aktualeco dum la pasinta jaro.

La 12an S-ro R. Van Eynde prezentis dokumentajn filmojn pri diversaj temoj.

La 19an : jara kunsido. La Prez. S-ro M. Jaumotte honorigis la ĝebubileantojn de la grupo kaj disdonis medalojn "pro fideleco", al S-ino L. Merckx (40 jaroj da membreco) + artan plaketon pro veteraneco : al S-ro H. De Hondt (35 jaroj) ; al S-ino R. Van Eynde, S-roj H. Jacques kaj K. Van Gompel (15 jaroj) ; S-ino A. Boffejon, F-inoj H. De Coene, I. Tytgat kaj K. Tytgat, S-roj H. kaj P. de Roover (10 jaroj). Nome de la ĝebubileantoj F-inoj I. kaj K. Tytgat surprize afable dankis. S-ro R. Balleux, kasisto, raportis pri la financoj en la grupo kaj kun ĝojo povis anonci favoran balancon kun malgranda profito. La sekretario, S-ro J. Verstraeten, superrigardis la grupan aktivecon dum tuta jaro kaj rimarkis diversajn enkuraĝigajn faktojn kaj ankaŭ konkludis en favora senco. Finfine Prez. Jaumotte dankis ĉiujn gekunlaborantojn pro la streĉa laboro kaj petis nur unu fakton : daŭrigi la nuan aktivecon en la sama bona spirito. Tio donis la okazon al S-ro I. Durwael, Vic-prezidanto, laŭdi, siavice, la Prezidanton Jaumotte.

Dimanĉon, la 21an, en la festosalonoj "Mangus" 43 gepartoprenantoj al la jara bankedo travivis plurajn agrablajn horojn. Festparoladis S-ro M. Jaumotte, Prez., kaj S-ro I. Durwael respondis al lia alvoko je konstanta kunlaborado en la movado. S-ro R. Jacobs, Prez. de Brusela Grupo Esperantista, parolis nome de la brusela delegacio salutante kaj dankante. S-ro H. Boffejon - per multkoloraj vivantaj floroj-honoris S-inon Marg. Jaumotte, Prezidant-edzinon. Tombolo kun amaso da premioj kreis iun distran, plenesperan sferon. S-ro J. Montmirail flegis la muzikan sondekoron kaj por la belaj prizorgitaj menuoj respondecis S-ro Roger Jaumotte.

La 26an la Vic-prezidanto, S-ro H. de Roover, faris paroladon pri "Somera Restado en Ardèche" kun belaj

kaj multaj diapozitivoj en koloroj. Plurajn objektojn ekspoziciitajn (plantojn, insektojn, ŝtonojn, k.t.p.) oni povis admiri poste.

FAMILIA VIVO :

Pensiumiĝo de S-ro R. Balleux :

La 1an de decembro S-ro R. Balleux, nia grupa kasisto, pensiumiĝis.

EDZINIĜO :

Kun plezuro ni aŭdis pri la edziniĝo de F-ino Conny Schellekens. Ŝi estas nun S-ino De Greef. La jus edziniĝinto estas la fratino de S-ro Fr. Schellekens, la ĉefdelegito de U.E.A. por Belgio kaj fidela membro de La Verda Stelo. El la tuta koro ni gratulas la novajn geedzojn.

NOVA U.E.A.-DELEGITINO en Antverpeno :

Pro la ekŝiĝo de S-ino L. Bernaerts kiel delegitino de U.E.A. por Antverpeno, S-ino J. De Hondt transprenis tiun taskon.

S-ino Jeanne De Hondt, vidvino jam kelkdekojn da jaroj de S-ro Louis De Hondt (iama fervora kaj vigla membro kaj estrarano de La Verda Stelo) loĝas en Antwerpen 2, Zamenhofstraata, 7/2.



JUNULARA GRUPO de BRUGGE

Januaro estis interesa monato por la junulargrupo. Ni ne nur havis la novan kurson sed ankaŭ ŝanĝon en la koncepto de niaj kunvenoj.

Efektive, la dusemajnaj kunvenoj estis anstataŭitaj per du paroladoj, unia de S.ino Roose: "Sana nutraĵo por junuloj" kaj dua de S-ro Maertens: "Theihard de Chardin".

Ni povis ĉiufoje fidi sur kerno de proksimume dek ses membroj: Ne malbone se, kun tiu kerno, ni povas konstrui ĵarfunkciadon. Tiu ŝanĝo en la koncepto de niaj kunvenoj estis konsiderita kiel sekvanta grado en la kresko de nia grupo. Estis efektive tiel, ke ni devas unue meti bazon per la kono de la Esperanto lingvo kaj nur poste, ni povas ampleksigi la laboron.

Sed, estantaj certaj ke tiu unua kondiĉo ĉiam povas esti perfektigata, ni denove donos grandan atenton al la konado de nia internacia lingvo dum februaro, kaj ĉe la fino de tiu monato, ni havos agrablan festkunvenon.

Ni tamen ne volas kuri en la estonton sed revidi ankaŭ januaron por esprimi nian koran dankon al S.ino Roose kaj S-ro Maertens por iliaj agrablaj kaj instruaj paroladoj. Kion ajn oni pensas estas kaj restas granda helpo por nia grupo, havi kelkajn plenkreskulojn kiel subtenon ĉe la organizado de niaj agadoj kaj ĉe la konstruo de nia grupo mem.

Fine, ni volas danki S-ron Roose por lia laboro, instruante la novajn kursistojn: ni esperas ke lia laboro ne estos senutila.

P. Blondelle

KARLOREGA GRUPO ESPERANTISTA CHARLEROI

La decembra bankedo bone sukcesis - bonega menuo kaj vino oferita de la estro. Ni forlasis unu la aliajn nur je la "malgrandaj horoj".

La 1a de februaro, F-ino A. ORSOLINI prezentis kolorbildojn de PRIMOSTEN, la fama Esperantujo de Jugoslavujo en Salano 4 de la Urbdomo de Charleroi.


Ni rememoras al kelkaj membroj, N° de la P.C.K. 67.32.84, de Karlorega Grupo Esperantista - Charleroi:

por ke ili ne forgesu transdoni sian kotizon 1968a.

Membro abonanto UEA, BEF, KGE, 490 -.
Simpla Membro BEF, KGE 150 -.
Geedzoj kaj junuloj ĝis 18j. 60 -.
Kadetoj ĝis 14j. 25 -.
Membro simpatianta 20 -.
Sidejo: 73, rue de Montigny, Charleroi.

Korespondadreso: A. ORSOLINI, 6, rue P. Pastur, Charleroi.
Kunvenejo: LE CAROLO, ĉiujauĉe 20 ĝis 22h. Pl. Charles II
Kurso: Ecoles de la rue de la Digues (Garçons) Charleroi.

La Komitato.



GRUPA VIVADO

VERVIERS

Jen la programo de la aktivecoj de la Esperantista Grupo de Verviers: la grupo kunvenas ĉiun duan mardon je la 20a, ĉe la Reĝa Ateneo: la 26a de Septembro, S-ro Dohogne prelegis pri "Libertempo en Dolomitoj" kun belegaj lumbildoj.

La 10a de Oktobro, S-ro Demarche parolis pri "Vieno kaj Bavarujo" kun tre ŝatataj lumbildoj.

La 24 a de Oktobro, S-ro Héron prezentis la trian parton de la "Historio de la Homaro": De la Krucmilitoj ĝis hodiaŭ.

La 21a de Novembro, paroladis S-ro Sacerdoto Müller pri: "Memelpensita lernomaŝino por esperanto".

Poste okazis la ekzamenoj kaj la klasoj ne plu funkciis kiel kutime: la profesoroj kaj la klasocambroj ne

estis liberaj! Post la ekzamenoj, la Grupo helpis la C.J.E.V. (Club des Jeunes Espérantistes verviétois) por prepari kaj efektiviĝi ĝian egan projekton, kiu dividiĝas en tri fazoj:

1) La 12a de Januaro 1968, S-ro Ambasadara Moŝto de Aŭstralio R.L. Harry solene inaŭguris en la grandega magazeno "Grand-Bazar" tre belan ekspozicion pri Esperanto kaj pri Antarkto.

2) La saman tagon vespere, S-ro R.L. Harry prelegis pri "Antarkto" kun projekcio de pluraj filmoj koloraj kaj blanknigraj, en la festsalonego de la Reĝa Ateneo de Verviers.

3) De la 12 a la magezenoj de Verviers estis malfermataj ĝis la 23a januaro, la Ekspozicio ricevis multajn vizitantojn kaj la lernantoj de la C.J.E.V. membrigis plurajn personojn al ilia klubo kaj al ilia jurnalo "Esperantista Amikeco".

Vidu apartan artikolon.



Ensendojn	por	la
marto	-	aprila
numero	ni	petas
antaŭ	la	20.3.1968

KORESPOND-ADRESO

Ni Anoj de grupo "Amikeco de Popoloj" petas vin.

Ni ŝatus fari amikan kontakton por fortigo de Esperanto movado kaj por la lernado de niaj novaj geesperantistoj. Niaj gelernantoj havas jaraĝon inter 12-60 jaroj.

Iliaj profesioj estas diversaj.

Atendante viajn karajn leterojn
kore salutas

Laslo Baka, Dunakeszi, Karolyi 4-11-13 Hungarujo
prezidanto de la grupo

ESPERANTISTA KULTURDOMO

(Fondinto : H. Micard)

Kastelo Gresillon
49 - BAUGÉ
FRANCUJO

Kulturaj Arangoj 1968

PASKAJ FERIOJ

(Alventago : 4-an de Aprilo — Forirtago : 11-an de Aprilo)

Sesa Kultura Semajno

organizita de U.F.E. kaj G.E.E.

PROGRAMO :

Pliprofundigo de la lingvokonoj per teksto ; pedagogia iniciado al instruo de la lingvo ;
kultura kaj arta aplikado de la lingvo ; prelegoj.

EKSKURSO : la 7-an de Aprilo.

De Pasko ĝis la fino de Julio estos eble akcepti grupojn eĉ ne-esperantistajn por pli malpli longaj periodoj.

SOMERA PROGRAMO

Unua Periodo

Alveno : 30-an de Junio — Foriro : 21-an de Julio

Esperantaj Studoj

Gvidado : A. RIBOT

Kurso por komencantoj ; praktika kurso ; supera kurso.

EKSKURSOJ organizeblaj : (vidu « Dua Periodo »).

Dua Periodo

Alveno : 22-an de Julio — Foriro : 1-an de Aŭgusto
(estos eble alveni la 21-an kaj foriri la 3-an)

Internaciaj Turismaj kaj Kulturaj Ferioj SEMINARIO

organizita de U.E.A.

pri la temo « Modernaj Formoj de Laboro en la Nuntempa Esperanto-Movado »
Partoprenos prof. d-ro Ivo Lapenna kaj aliaj plej kompetentaj respondeculoj sur diversaj
kampoj de aktiveco en Esperanto-movado.

Gvidanto : D-ro Peter Zlatnar, Rimska 7, LJUBLJANA

Detala programo havebla en Januaro.

EKSKURSOJ : Loire-kasteloj (25 F.), urbo Nantes (30 F.), urbo Le Mans (20 F.),
urbo La Flèche (12 F.).

GRANDA RALIO organizita de E.K.D.

Tria Periodo

Alveno : 4-an de Aŭgusto — Foriro : 25-an de Aŭgusto

KULTURAJ ESPERANTISTAJ SEMAJNOJ

Dimanĉon la 4-an (21 h.) : Interkona vespero.

De la 5-a ĝis la 23-a : ĉiutage :

9 h. 30 - 11 h. 30 : **Esperanto-kursoj.**
Porkomencanta kurso.
Praktika kurso.
Supera kurso.

14 h. - 16 h. : Bindado, korbofarado

18 h. - 19 h. : Konversacio.

21 heures : Paroladetoj, filmoj, kantoj.

Sabaton la 24-an :

Ekzamenoj : Atesto pri Lernado, Atesto pri Supera Lernado, Atesto pri Kapableco, Pedagogia Atesto.

Dimanĉoj 11-a kaj 18-a estos liberaj.

Ekskursoj : Vidu « Dua Periodo ».

Kvara Periodo

Alveno : 25-an de Aŭgusto — Foriro : 8-an de Septembro

STUDPERIODO organizita de U. F. E.

PORKOMENCANTA KAJ PRAKTIKA KURSOJ

Ĉiutage :

9 h. - 11 h. : Gramatiko-leciono.

11 h. - 12 h. : Konversacio.

16 h. - 17 h. 30 : Studo de teksto.

17 h. 30 - 18 h. 30 : Ludoj en Esperanto.

21 h. : Ludoj, kantoj, filmoj, paroladetoj.

Sabaton 7-an : Ekzamenoj.

Ekskursoj : Vidu « Dua Periodo ».

De la 8-a ĝis la 15-a de Septembro la kastelo estos malfermita por ripoz-periodo se la nombro de aliĝintoj estos sufiĉe granda.

Bonvolu rezervi viajn ĉambrojn sufiĉe frue

INFORMOJ KAJ ALIĜOJ :

ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kastelo Gresillon, 49 · BAUGÉ

Ne forgesu, ke la revuo « Kulturaj Kajeroj » informos vin pri la vivo en Grésillon. Provnumero kontraŭ respondkupono.

manuŝaturajo firma DE BROUWERE

Magdalenastraat 29 Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216.54

VIRINAJ BLUZOJ **" MAGDELEINE "**

deponita kvalitmarko

por la eleganta sinjorino

la perfekta konfekcio

fabrikita el plej

altkvalitaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj
konfekcibutikoj

PRECIPAJ CENTROJ :

Antwerpen	:	Aalmoezenierstr. 2 Anselmostr. 17 Nationalestr. 87 Leysstraat 10
Arlon	:	12 Marché-aux-Légumes
Brugge	:	Breidelstr. 8
Brussel	:	Anspachlaan 194 Oude Kleerkoperstr. 31
Gent	:	Brabantdam 21
Herstal	:	4 Rue Large Voie
Leuven	:	Bondgenotenlaan 13
La Louvière	:	16 rue Albert 1er
Luxembourg	:	67 Place de la Gare
Mechelen	:	IJzeren Leen 32
Oostende	:	Kapelstraat 23
Roeselare	:	Ooststr. 124
Tournai	:	75 Rue Royale
Turnhout	:	Herentalsstr. 6
Verviers	:	2 Pont St. Laurent
Wetteren	:	Jos Buyssestr. 39-a